estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ la mondo).

Numero 160 — Aŭgusto, 1999

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Geoffrey Greatrex — preskontrolisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:
Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas $8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas $15

☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆ ☆

# PARTETO DE MIA ESPERANTO-AGADO

fare de Irene Szücs

En januaro 1990 mi decidis reorganizi la Esperanto-movadon en la urbo Oradea, Rumanio. Tiam mi ne havis lokon por okazigi renkontiĝojn kaj organizi kursojn de Esperanto, kaj mi ne havis oficialan monon por tiu celo. Tamen mi havis ardan deziron kaj firman volon fari Esperanton en Oradea kaj mi faris Esperanton, ĉar “Kiu volas povas” (Zamenhof).

En mian domon mi invitis kelkajn Esperantistojn kiujn mi konis, kaj mi parolis al ili pri mia intenco kaj mia projekto. Tri tagojn poste, la lernejo n-ro 14 disponigis al mi lernoĉambron por Esperanto, dank’ al nia juna amiko, inĝ. Aleksandro Varga.

En la dua parto de januaro 1990 mi organizis la unuan oficialan kurson de Esperanto, kiu finiĝis en junio kun 39 kursanoj. En julio ni partoprenis landan Esperanto-kongreson en Timiŝoara kie nia delegacio superis ĉiujn aliajn delegaciojn, unue pro la nombro de partoprenantoj de iu loko (32 personoj) kaj due, pro la programo prezentita de ni en kiu la poemoj de Zamenhof kaj Antonina Apollo, deklamitaj de ĉarma knabino Noemi Varga kaj de juna kaj tre talenta aktorino Mirela Corbeanu, ravigis la ĉeestantojn.

Je la 15-a de septembro 1990 mi organizis la duan Esperanto-kurson, kiu finiĝis en festa maniero en junio 1991 kiam la lernantoj ricevis mian personan

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

donacon, la meritatan diplomon. De tiam dum la pasintaj sep jaroj, semajnon post semajno, jaron post jaro, la instruado de Esperanto senĉese daŭris en Oradea. Ne estis facile, ĉar en nia filio ne estis lernolibroj. Mi pretigis lecionojn kaj per tajpilo mi multobligis ilin, por ke ĉiu lernanto havu studmaterialon. Kiel legaĵo, mi elektis el la revuo ***El Popola Ĉinio*** kvin artikoletojn por komencantoj, per kopiilo mi multobligis ilin en 30 ekzemplerojn, kaj mi uzis ilin dum la studhoroj.

Ion novan mi enkondukis en mian instruadon. Dum la kurso por progresantoj, laŭ alfabeta ordo, ĉiu lernanto pretigis lecionon laŭ sia elekto, kaj li aŭ ŝi mem gvidis la respektivan studhoron. La metodo pruviĝis efika, ĉar tiumaniere aperis diverseco de ideoj, metodoj, imagoj kiuj faris la studhorojn pli interesaj, allogaj, kaj gajaj. La metodo celis pensigi, laborigi kaj paroligi ĉiun, samtempe ebligante ĉiun kiom ajn helpi aliulon je la lernado de la lingvo.

En 1992 mi kondukis 16 membrojn de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) al Alba-Julia, kie fondiĝis IKUE-sekcio en Rumanio. Pastro Duilio Magnani estis la tiama prezidanto de IKUE. Ankaŭ tie ni prezentis la religian muzikon dum la Sankta Meso.

La 23-an de septembro 1992 ni akiris la juran personecon, do ni fariĝis memstara asocio.

Inter la 15-a ke junio kaj la 6-a de novembro 1993 mi dediĉis la tempon al la instruado de Esperanto al juna romkatolika pastro Johano Mahajduda kaj al kantoro Endre Lukacs por ke ili povu partopreni la religiajn Esperanto-kongresojn en la mondo, ankaŭ tial, ke okaze de malfermo de lernojaro 1993-1994 estu celebrata Sankta Meso en Esperanto. Tio okazis en romkatolika Baziliko, kie la partoprenantoj estis ege impresitaj ankaŭ pro la belega Esperanto-kantoj prezentitaj de koruso.

En la loka ĵurnalo ***Bihari Naplo*** aperis artikoleto pri la evento, prezentita kiel premiero ne nur en Oradea, sed en Rumanio, ĉar unuan fojon Sankta Meso estis celebrita de loka pastro en Esperanto.

La subskribanto de ĉi tiu artikolo bedaŭrinde forgesis mencii la heroojn de tiu ĉi premiero. Mi estas tre feliĉa, ke ĉio bone sukcesis.

Ĉe ni Esperanto fortiĝis ankaŭ per tio: al la biblioteko Bunyitai Vince, kiu troviĝas en la sama konstruaĵo kun la lernejo, mi donacis el mia biblioteko lernolibrojn, vortarojn, ĵurnalojn kaj revuojn, entute 730 pecojn kolektitaj de mi dum 25 jaroj, por pli bona diskonigo de Esperanto. Mi mencias tion esperante, ke ankaŭ aliaj Esperanto-veteranoj trovos la ideon efika kaj ankaŭ ili aplikos favore al nobla Esperanto, kiu estas Paco kaj Amikeco inter la popoloj.

Nia agado estis konata ankaŭ eksterlande. Tial konvinkitaj ke ni laboras konkrete por disvastigo de Esperanto en nia urbo kaj lando, kelkaj redakcioj

daŭrigata ⇒

daŭras ⇒

donacis al ni ekzemplerojn de siaj revuoj. Tiel, dum jaroj en nia Asocio abundis ***Heroldo de Esperanto***, ***Esperanto***, ***Inter Ni*** (el Kanado), ***El Popola Ĉinio***, ***Esperanto en Skotlando***, ktp.

Granda sukceso estis la tri senpagaj ekskursoj por niaj geesperantistoj, dank' al mondonaco de sinjoro Stevens Norvell el Kanado. Du ekskursoj okazis en 1996 (je la 20-a kaj 27-a de aprilo) kiam per aŭtobusoj 40 geamikoj vojaĝis al belaj kaj historiaj lokoj de najbaraj distriktoj. La tria ekskurso okazis la 15-an de septembro 1997, per kio mi finis mian agadon kiel prezidantino de nia loka Esperanto-asocio. Laŭ statuto, mi estris la lokan Esperanto-asocion dum du mandatoj.

Malgraŭ malfacilaĵoj ĉio estis treege bela, ĉar tiun tempon (januaro 1990 – oktobro 1997) mi dediĉis al Esperanto. Nun retrorigardante al mia agado, feliĉe mi povas diri ke la sukceso estas rezulto de mia senĉesa laboro.

Pro kormalsano mi devis ĉesi mian instrulaboron. Bonŝance mi jam pretigis la anstataŭanton, mia kursano prof. Simon Ladislaŭ, kiu en 1998 komencis instrui Esperanton. Mi gratulas lin!

Mi deziras esprimi multan dankon al ĉiuj bonaj geamikoj, kiuj ĉiam pretis helpi min, se mi bezonis tion. Precipe Paŭlo Barabas, vic-prezidanto, Gizela Abrudan, librotenisto, Eugenia-Ekaterina Popoviciu, kasisto, kaj komitatano Suzana Barabas kiu, post dujara kurso, organizis Esperanto-rondeton en lernejo kie ŝi instruas matematikon. Ŝi publikigis dujaran Esperanto-kurson en monata revuo por lernantoj. Al ŝi mi konfidas la sorton de nia Esperanto-movado. Ŝi estas la nova prezidanto de la loka Esperanto-asocio.

Specialan dankon mi deziras esprimi al mia bona kaj malnova amiko Attila Makay, kun kiu per Esperanto mi konatiĝis antaŭ preskaŭ 30 jaroj. Dum tempo ni ambaŭ klopodis diskonigi Esperanton en nia urbo. Post januaro 1990, malgraŭ la fakto ke li ne konsentis esti estrarano (sekretario) li ĉiam surprizis min per bonvenaj agoj. Al niaj kursanoj ofte li disponigis revuojn el sia biblioteko. Li donacis malgrandajn sumojn al fonduso de nia asocio. Li organizis interesajn ekspoziciojn de libroj kaj diversaj esperantaĵoj en plej taŭga loko, urba biblioteko, kiu tage estas vizitata de centoj da legantoj. Attila Makay estis kaj estas bona amiko kaj vera esperantisto.

Al li kaj al ĉiuj miaj bonaj geamikoj multan dankon kaj sinceran gratulon.

— Irene Szücs, Oradea, Rumanio

**Noto de la redaktoro: Irene Szücs estis dum jaroj la vaste konata gvidantino de Esperantistoj en Oradea. Steĉjo Norvell renkontis ŝin tri foje dum vizitoj al Oradea.**

☆ ❀ ☆ ❀ ☆ ❀ ☆